


LA JUNIA VIVO



MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.

ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

GABES: LA SUNA OAZO.

En suda Tunizio, apenaŭ kelkajn mejlojn for de la lastaj arboj de la giganta olivarbaro, meze de vasta, sabloplena ebenaĵo, fiere leviĝas la oazo Gabes. Tiu palmejo ŝajnas verda insulo elmergiganta el flava polvomaro.

Antaŭ longe Gabes estis nur ia rifuĝejo por karavanoj. Depost la alvenado de la francoj, tiu pitoreska vilaĝo senĉese pligraviĝis kaj nun ĝi estas preskaŭ urbo. Gabes konsistas el tri diversaj partoj.

Unue la haveno kaj la franca kvartalo. La haveno, kvankam malgranda, ŝirmas multajn bordŝipojn kaj skunojn. La negoco estas sufiĉe grava (fruktoj, palmobranĉoj, alfo k.t.p.) kaj la kontra-bando prosperas. En la franca kvartalo la francoj provis imiti iomete la aspekton de l' eŭropaj urbetoj en tiu afrika loko. Kaj ili sukcesis.

Apud la franca kvartalo estas la araba urbo. Tie la stratoj estas mallargaj kaj el la blankaj, malaltaj domoj fluas ebriligaj odoroj de incenso. La araba bazarro estas tre pentrinda. Oni trovas tie bananojn, kokosojn, figojn, daktilojn kaj ankaŭ barbirojn, ŝuistojn kaj lertajn poŝtoŝtelistojn. La ge-araboj marĉandas multe, sed malmulte aĉetas. Cetere, ili venas en tiun foiron precipe por

babili. La viroj sidas antaŭ kafej-sojloj, trinkas kafon kaj fumas kanabfumajon. Tiam, kvietigitaj, ili longe kaj ofte sin intersalutas en sia bela suda idiomo: „Sbah el-ħir ja ĥuja!” („Bonan tagon, ho, frato mia”).

Sed la plej bela parto de Gabes sendube estas la miriga palmejo, vera laŭbego de freŝeco. Plene klara „ued” (rivereteto) flustrante fluas ĉirkaŭ la palmaro. Tie, sur larĝaj ŝtonoj, la arabaj virinoj venas por lavi tolaĵojn apud la trinkantaj azenoj kaj dromedaroj.

Krom la palmoj kaj la bananujoj estas ankaŭ kulturitaj legomoj kaj ĉiaj fruktarboj. Primitiva, sed genia irigacisistemo donas al ĉiu kulturisto egalan parton da akvo. Ĉar en la sudo de Tunizio akvo estas malmulta.

El la palmoj oni eltiras kuriozan fluidaĵon, kiu estas trinkaĵo, sed ofte ankaŭ drinkaĵo. Ĝi estas la „lagmi” aŭ palmsuko. Freŝe ĉerpita el la arbsupro, „lagmi” estas bona kaj saniga. Sed la araboj fermentigas ĝin kaj ebriiĝas per tiu likvoraĉo.

La palmeja bestaro estas tre varia. Sur la arboj belaj birdoj estas videblaj: flavaj orioloj, mikskoloraj kardeloj kaj graciaj silvioj. Grandaj verdaj lacertoj kaj strangaj kameleonoj senmove restadas sur la palmbranĉoj. Sed estas ankaŭ danĝeraj bestoj: la nigraj kaj flavaj skorpioj tre venenaj, la teruraj kornvipuroj, tiel grandaj kiel fingro, kiujn oni ne povas rimarki, ĉar ili estas samkoloraj kiel la sablo.

Do, fremdaj gckamaradoj, se vi ne tro timas la serpentojn, la skorpiojn kaj moskitojn, se vi emas manĝi polvon, se vi ŝatas morti pro soifo, rajdante sur trobonanima sed stultega dromedaro sub varmega suno, tiam ne prokrastu veni al Gabes.

André Secco (18-j.), 5 rue du Calvados, Mégrine, Tunizio, kiu tre volonte respondos al ĉiuj informpetoj, se ili estas akompanataj de respondkupono. (Mi estas ne bankisto, sed studento).

DU DATOJ: 1-9-'39—1-9-1949.

Kiu el vi, karaj ge-legantoj, ne memoras la 1-an de septembro en 1939?

Ĝi estis la malfeliĉa anonco de la 2-a mondmilito. Ni, poloj, plej bone povas prijuĝi la kruelaĵojn de ĉi tiu milito. Nia lando ruiniĝis; la kara ĉefurbo Varsovio preskaŭ malaperis. En la koncentrigejoj mortis aŭ estis mortigataj pli ol 6 milionoj da samlandanoj. Inter ili multaj esperantistoj.

Kiu vizitis nian landon tuj post la milito, vidis pli ol li supozis

vidi „Varsovio ne plu estiĝos; Pollando ne baldaŭ leviĝos el la ruinoj” Jen diraĵoj, kiujn oni povis aŭdi.

Hodiaŭ, kvar jarojn post la fino de la milito, ni, poloj, ne bezonas multe paroli. La samaj, kiuj antaŭe dubis, ĉu Varsovio leviĝos, diras:

„Vera miraklo okazis en tiu lando! Varsovio vivas kaj tre rapide kreskas la domegoj, lernejoj, preĝejoj k.t.p.”

Jes, vere. Tie ĉi okazis miraklo. Tiun ĉi miraklon oni povis atingi nur dank’ al la sindona laboro de ĉiuspecaj laboristoj, inĝenieroj k.t.p. Oni povas konstati eĉ, ke en Varsovio ekfloras tute novaj konstruaĵoj, pli imponaj ol la ĝisnunaj. Simile en nia tuta lando okazas grandskala rekonstruado.

Ankaŭ la kultura vivo de la popolo ĉiam progresas. Komparante la hodiaŭan kaj antaŭmilitan statojn de klerigado, ni rimarkas, ke la nombro da alt- kaj mez-lernejoj estas pli granda ol antaŭ 1939.

Sur ĉiu tereno la situacio estas pli bona ol antaŭ la milito, kvankam ne sufiĉe. Tiel ankaŭ en la junulara Esp. movado. Ĝis 1939 povis interesiĝi pri Esperanto nur tiuj, kiuj vizitis mezgradan lernejon kaj troviĝis en bonaj vivkondiĉoj. — Kaj tiuj bedaŭrinde ne estis tro nombraj. Hodiaŭ, dank’ al la zorgemo de la popola registaro en nia lando, multaj gejunuloj (eĉ ge-pliaĝuloj) vizitas la diversspecajn alt- kaj mezlernejojn. Ĉiu povas ĉerpi laŭbezone el la plej valora trezorejo: SCIENCO.

La ge-lernantoj kaj ge-studentoj venas al la konkludo, ke plej bone estu instruata nur unu lingvo por interlandaj rilatoj. Ni, junaj geesperantistoj en Pollando, bone scias, ke **Esperanto estas la sola solvo** de tiu ĉi problemo.

Malgraŭ tio, ke la nombro da junaj ge-batalantoj poresperantaj ne estas grandega, ni esperu kaj agu sur tiu kampo, kiu emas akcepti „ian facilan lingvon por internaciaj rilatoj”.

Diversaj estas la metodoj, per kiuj oni povas enokuli Esperanton. Mi mem kiel lerninto de la Ŝtata Komerca Liceo en Gdynia kaj anua lernanto de Esperanto spertis jenon:

Ĉiam, kiam aperas novaj pensoj kaj ideoj, la homoj ignoras ilin. Same faris miaj kolegoj kaj ripetis: „Certe Esperanto estas lingvo, sed ankoraŭ ne taŭga por internacia komunikigado, ĉar malmultaj homoj parolas ĝin.” Sed pasis kelka tempo kaj alvenadis al nia lernejo multaj leteroj el „Esperantujo”. Tiam fine konvinkiĝis la kontraŭuloj, ke ekzistas en la mondo Esperantistoj, kaj ili ĉesis ripetadi la sekajn vortojn „sed ankoraŭ ne sufiĉe taŭga, ĉar”. La samaj kontraŭuloj eĉ ŝanĝis sian opinion pri Esperanto kaj komencis lerni ĝin de mi. Jen atesto, kion alportas pacienco kaj persisto.

Oni povas uzi ankaŭ jenan manieron: Kiam inter vi, gekolegoj, troviĝas ge-amikoj, kiuj ne lernas Esperanton nur pro la fakto, ke ili ne estas certaj pri ĝia valoro, vi bonvolu donaci Esperantan lernolibron, ekzemple okaze de ilia nomtago, kaj surskribu la ĉi-suban dediĉon (se eble, kun traduko en la gepatran lingvon):

Jen mi dediĉas al vi	La koroj konstante batantaj
Libreton tiun ĉi,	Ne nur por ni,
Per kiu malfermos sin al vi	Sed ankaŭ por vi!
La Tutmondo, la Homaro;	Per kiu vi trovos tiajn homojn,
Per kiu malfermos sin al vi	Kiuj feliĉon enportos en vian domon!

Gesamideanoj, gekamaradoj, permesu al mi direkti al vi alvokon: „DAŬRE AGU POR ESPERANTO, EĈ SE LA GEKOLEGOJ KAJ GEKONATOJ IGNORAS VIN. Ne pensu, ke vi laboras vane. Ju pli streĉa estos via agado, des pli vasta estos la rikolto!

En septembro 1949 komenciĝis en Pollando (certe ankaŭ en multaj aliaj landoj!) nova lerneja jaro: ĝi estu plena de porpaca laboro, ankaŭ de poresperanta, ĉar per Esperanto ni certe proksimiĝas ne al milito, sed al Paco!

„Benito” el Pollando.

RADIO.

Mi turnas butonon: voĉo parolas piano kaj violono kune muzikas Silentas

Kaj mi pensas pri tiuj, kiuj aŭskultas kiel mi.

Nekonataj geamikoj, la silento anstataŭis la mirigan ondovoĉon. Fermu viajn okulojn kaj ni kune revu:

La homo eltrovis la ondojn. Obeemaj kaj blindaj ili super limoj ĉirkaŭas la montojn kaj ebenaĵojn, marojn kaj kontinentojn. Sciigo, sendita de kiu ajn terpunkto, tuj ĉie estas ricevata.

Ĉu vi aŭdas tiujn venkajn aŭ preĝajn kriojn, tiun krudan aŭ mildan muzikon, tiujn vibrigantajn aŭ plorigantajn voĉojn? Vidu ilin: reto teksas sin ĉirkaŭ la mondo. Jen la maristo sur la senlima oceano, jen la aviadisto alte en la aero, jen la esploristo en la dezertoj. Ĉu ili estas solaj? Ne. Kreante novan potencan kunigilon inter la homoj, la radio venkis la izolecon, por ĉiam.

Nekonataj amikoj, ĉu vi vidas, en la urboj kaj kamparo, tiujn infanojn, junulojn, kiuj aŭskultas la sorĉan voĉon? Pli forte kaj pli rapide batas la koroj; la okuloj brilas. Kaj en la animoj naskiĝas la amo aŭ la malamo. En la spiritoj brilas pli da scienco, pli da beleco, pli da vereco aŭ en ilin penetras la malvero.

La radio daŭrigas: semante lapacon kaj la militon. Semante la vivon kaj la morton.

Sed mi volas kredi, ke, iun tagon, la homoj komprenos, ke ili estas fratoj. La paco estos ebla. Ĉiuj pli bone konos unu la alian, ĉar ĉiuj sciös Esperanton. La homaro havos sencon. La radio havos sencon kaj ĝi havos nur unu voĉon, kiu kriegas al la tuta tero: AMU! AMU!

C. Boissieux, Rives, Francujo.

I.L.E.I.-RUBRIKO.

(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Veendam, Ned. Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

Gepatroj kaj Esperanto La ĝusta vojo.

La estro de Lymington County Secondary Boys' School, Dagenham, Essex, Anglujo (11-15 jaruloj) sendis la sekvantan leteron al la gepatroj:

Karaj Gepatroj,

La lerneja Esperanta grupo preparas festeton je merkredo, la 9-a de novembro, je la 8-a p.t.m., do ni aranĝos la monatan kunvenon de la gepatroj kaj instruistoj samvespere, samhore, por ke vi konstatu la valoron lerni Esperanton, kiel internacian lingvon kaj kiel rimedon plifaciligi internacian interkompreniĝon. Ni esperas bonvenigi du, tri

parolantojn, kiuj pritraktos la temon.

Bonvolu fari vian eblon kunesti kun ni.

Via sincere, F. J. May, Lernejestro.

Rezulte de la letero 60 gepatroj alvenis, pli ol iam antaŭe. 30 knaboj faris programon. Oni ankaŭ aŭskultis paroladon kaj provlecionon. Poste sufiĉe da gepatroj postulis kurson kaj instruisto en la lernejo gvidos tiun. Esperanto jam dum multaj jaroj estas deviga en la lerneja programo.


Ankaŭ ĉe Whitburn, Co Durham, Anglujo okazas kurso por gepatroj, kiuj deziras kompreni siajn infanojn, kiam ili parolas Esperanton!

Ĉi tiu intereso inter la gepatroj estas grandega helpo al la instruado de la lingvo. Gratulojn al ambaŭ lernejoj!

Noto de la red.: Imitinda ekzemplo. Ni atentigas niajn gekolegojn pri tia labormaniero. Laŭ ni: La ĝusta vojo al Esperanto en la lernejon.

Nova kasisto: La nova kasisto de la nederlanda grupo N.G.G.E. estas k-o H. de Kuyter, Noordeinde 101, Volendam.

Li informas, ke ne ĉiuj anoj pagis por 1949, kaj petas baldaŭan ordigon de la financaj aferoj. Lia poŝtĝirnumero estas 305955.



Kiel vi eble jam scias: en Nederlando ekzistas speciala oficejo, kiu laboras por la enkonduko de Esp. en la lernejojn. Ĝi estas tre aktiva, havas la subtenon de ĉiuj Esp. organizoj kaj multaj aliaj influrikaj ne-Esp. asocioj. Regule ĝi dissendas al oficialaj instancoj komunikaĵojn pri nia movado. Ĉisube sekvas kelkaj, kiuj verŝajne estas interesaj, ankaŭ por ne-Nederlandanoj.

Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado” C. Krusemanstr. 43/3, Amsterdam-Z.

En la unuaj tagoj de januaro ni dissendos, same kiel la pasintan jaron, demandlistojn al la gvidantoj de Esperanto-kursoj por gelernantoj, kiuj estas konataj al ni.

Sed, tre ofte evidentiĝas, ke okazas tiaj kursoj, pri kiuj ni ne estas informataj. Kompletaj informoj pri ĉi tiu tereno de la movado tre gravas por la sukceso de la oficeja laboro. Tial ni urĝe petas ĉiujn membrojn kaj sekciajn estrarojn, ke ili konvinku sin, ke ĉiu kursgvidanto kiu ricevu nian formularon, ĝin efektive ricevis. Se necese ili zorgu, ke ĝi revenu al ni kompletigita. Se iu tia gvidanto ne jam ricevis la liston, bonvolu havigi al ni la adreson.

Ŝtataj Instruistaj Seminarioj. En la jenaj seminarioj nuntempe okazas E.-kursoj: **Deventer** kun 48 gepartoprenantoj, **Haarlem** 44, **Hengelo** 21 kaj **Leeuwarden** 48, inter kiuj du profesoroj. En Hengelo la E.-instruo estas deviga por ĉiuj gelernantoj de la unua klaso. En la aliaj urboj la kursoj okazas post la ordinaraĵ lernejaj horoj.

Nova paŝo antaŭen. La lasta jarkunveno de la „**Ĝenerala Societo de Profesoroj ĉe la Mezgrada Instruado**” sen diskuto akceptis la raporton de sia komisiono, kiu konkludis i.a.: „La enkonduko de Esperanto en la unuajn (plej malaltajn) klasojn de la mezgradaj lernejoj kaŭzus ne malfaciligon, sed faciligon, ĉar ĝi estus bona bazo por posta studo de fremdlingvoj. Konsekvence la komisiono opinias dezirinde, akcepti Esperanton inter la fakultativaj fakoj, okaze de la atendata renovigo de la instruado. Laŭ akirita sperto mi rajtas atendi bonajn rezultatojn de duhora instruado en la unua klaso aŭ de unuhora en la unua kaj dua klasoj ĉiusemajne.”

P. W. Baas.

Karaj lernejoj,

Unue dankon al ĉiuj, kiuj sendis manuskriptojn. En ĉi tiu numero estas la fabelo „Reĝo Bom”. Audry Moore en Anglujo verkis ĝin por ni. De lernantoj de s-ro Ohana en Maroko ni ricevis anekdotojn. Kaj venis sendaĵoj ankaŭ el Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Tunizio. Al ĉiuj multan dankon!

Sed en la antaŭa numero mi demandis, ĉu vi konas naciajn festojn. Kaj bedaŭrinde pri tio respondis nur s-ro Goodes (Brit.). Ĉu mi ankoraŭ povos atendi verkaĵojn pri tiu temo?

Nur du sendis frazojn ĉe la bildoj de „Nia Verkilo”. Ili estas: f-ino Juillard en Francujo (ŝi faris tre bonajn frazojn!) kaj David Browse en Anglujo. Tiu rikolto do ne estis granda. Espereble ankaŭ multaj aliaj lernantoj faris frazojn. Ili nur ne sendis ilin al ni.

Por la „tekstaĵo” en la oktobra n-ro estis pli da intereso. Pri tio ni ricevis multajn kartojn kaj leterojn kaj preskaŭ ĉiuj bone legis la literojn.

Nu, mi komprenas tion: legi estas pli facile ol skribi, ĉu ne? Sed tamen — faru vian eblon! Baldaŭ estos Kristnasko. Ĉu pri tio vi skribos? Ĉiu letero estos bonvena!

Agrablajn festotagojn!

N. K.


NIA VERKILO.

Nun ni estas en la lernejo!

Ĉu vi vidas la karton?

Respondu: La karto pendas

Ĉu vi vidas la instruiston?



Respondu: La instruisto staras

Li montras per

Li instruas n


Sur la karto

Inter la kontinentoj estas la

Desegnu per ruĝa koloro (kraĵono aŭ plumo) malgrandan krucon (x) en „via” kontinento.

Skribu ankoraŭ tri frazojn pri la instruisto.

Vi povas skribi multajn, multajn frazojn.



2.

klasejo, tabulo, muro, plan-
ko, karto, tuko, benko,
knabo, knabino, instruisto,
viro, infano, lernanto, kreto,
plumo, kraĵono; blanka,
nigra, bruna, ruĝa; skribas,
staras, sidas, instruas, lernas,



3.

Et la lernejo!!

La infanoj iras **el**
kaj ili iras **al**
La instruisto staras
Karlo donas
Li diras al la instruisto: „.....”

Kiu estas feliĉa?

Ĉu la lernantoj estas knaboj?

Skribu ankoraŭ du frazojn.

La Pego. = *p. verde cave*
vago a pinto

Malantaŭ nia lernejo estas la ludejo. Sur tiu ludejo staras du kaŝtanoj. En la kaŝtanoj ludas paseroj, sturnoj kaj fringoj.

Sed hodiaŭmatene s-ro Geurts, nia lernejestro, vidis pegon sur unu el la arboj. Li avertis nin, kaj ni senbrue iris al la fenestro. Ni vidis grandan, multkoloran birdon. Ĝi estis ruĝa, blanka, nigra kaj bruna.

En arbariĉaj regionoj de nia lando oni ofte povas vidi ĝin, sed ĉe ni malofte.

Pegojn oni nomas la ĉarpentistoj de la arbaro, ĉar ili jaŭte trapas sur la arbojn. Ili tiel serĉas insektojn. Estas ankaŭ verda pego. La pego verda tre bone povas ridi. Tion la multkolora ne kapablas.

Ni bone povis pristudi la belan pegon. Poste ni devis fari malgrandan rakonton pri ĝi. Ni ankaŭ desegnis ĝin.

Kiu el vi respondos al nia letero, ricevos belan desegnaĵon de la pego, kaj ankaŭ nian mempresitan priskribon de Edamo kaj la pego.

La infanoj de la elementa lernejo en Edamo (Ned).

Muŝo-fanfaronulo.

Bovo revenis laca de grenkampo. Dum la reveno muŝo restis sur unu el ĝiaj kornoj. Apud la vilaĝo ili renkontis alian muŝon, amikino de la unua. Ĝi demandis:

„De kie vi tiel venas, kamaradino?”

„Ĉu vi ne vidas tion?” demandis la unua. „De la laboro! Ni plugis!”

M. W. Koev, Kazanlik, Bulgarujo.

La Reĝo Bom.

Iam vivis reĝo. Lia nomo estis Bom.

Li ne estis bona reĝo, ĉar li tro ŝatis glacikremon. La reĝino estis tre bela kaj inteligenta, sed la reĝo estis tre stulta. Tro ofte li ekkriis, kiam li estis kolera: „Forkaku lian kapon!”

Iam li kriis al la konsilantoj: „Forkaku iliajn kapojn!”

Sed la reĝino diris: „Vi ne povas fari tion. Ĉiu certe estos kontraŭ vi!”

La sekvan tagon la konsilantoj envenis kun verda bileto.

„Tio estas vojaĝbileto al Punlando. Ĝi estas por vi kaj ĝi ne estas revena!” ili anoncis koleregaj.

Sed la reĝino havis pli bonan ideon. Ŝi flustris ĝin al la konsilantoj. Ili ridetis kaj foriris feliĉaj, ĉar ili sciis, ke la reĝino estas tre lerta.

Baldaŭ ŝi iris al la butikoj de la feinoj, kiuj fabrikis glacikremon. Ŝi mendis tre belan kaj bongustan glaciaĵon.

Dum ŝi reiris al la palaco ŝi vizitis maljunan sorĉistinon en malluma kaverno. Ŝi petis de ŝi specialan sorĉaĵon.

La sekvan matenon la feinoj alportis la glaciaĵon kaj la reĝino enmetis la sorĉaĵon. Tiam ŝi portis ĝin al la reĝo kaj diris:

„Jen estas via glacikremo, ho reĝo.”

„Mi ne deziras ĝin,” diris la reĝo, kiu estis en malbona humoro.

„Ho jes, karulo, vi certe deziras ĝin. Ĝi estas speciala regalo. Gustumu ĝin!”

„Nu, donu ĝin al mi,” diris la reĝo kun malbona tono en la voĉo. Li formanĝis ĝin kaj tiam li diris, kion li ĉiam diris, kiam li ĵus manĝis ion: „Mi volus denove manĝi tion!”

Ho surprizo! La glaciaĵo tuj reaperis same kiel ĝi unue estis. La reĝo denove manĝis ĝin. Denove kaj denove li faris tion kaj estis tute kontenta.

La reĝino anoncis la sukceson al la konsilantoj kaj ili kune regis la landon, dum la reĝo sentine manĝadis la magian glaciaĵon. Ĉiu estis tute kontenta kaj feliĉa.

Audry Prince (14-jara), Whitburn, Anglujo.

Kristnaskaj Festotagoj en Argentino.

La 24-a de decembro estas la mezsomera tago en Argentino. Tamen cetere la Kristnasko ne estas tre malsimila al kio ĝi estas — aŭ estis — en Eŭropo. La lokaj kutimoj de diversaj eŭropaj landoj ja vivas inter la homoj, kiuj devenas el tiuj landoj. Tiel vizitanto facile povas imagi, ke li estas en Anglujo, Hispanujo, Italujo aŭ Germanujo, laŭ la origino de la familio.

Sed ne ĉiam la kutimoj estas tute „precizaj”. Povas esti, ke post tipe itala festeno sekvas angla „plumpudingo”.

Por la infanoj de angla deveno la Kristnasko mem estas la plej grava el la tri festoj de tiu sezono. La aliaj estas la Novjartago kaj „El Dia de Los Magos” (La Tago de la Magaj Reĝoj) aŭ Epifanio, je la sesa de januaro.

Por la plej multaj, kiuj devenas de Hispanujo aŭ Italujo, la infanesto estas „El Dia de Los Reyes”. Tiam la Tri Reĝoj portas al ili donacojn, same kiel en aliaj landoj iom pli frue faras la Kristnaska Patro aŭ Sankta Nikolao. Kelkaj infanoj ambaŭfoje ricevas donacojn!!

Sed nun pri la Kristnasko mem. En multaj argentinaj hejmoj, precipe ekster la ĉefurbo, oni starigas en la vespero antaŭ Kristnasko reprezentaĵon pri la naskiĝo de Nia Sinjoro. Oni vidas tiajn reprezentaĵojn ankaŭ en ĉiuj preĝejoj, same kiel en la katolikaj preĝejoj en Eŭropo. Sed oni uzas ne nur ŝafojn, bovojn kaj azenojn. Povas esti ankaŭ kaproj, katoj, hundoj, leonoj, lamoj (sudamerika ŝarĝbesto) kaj aliaj bestoj laŭ la fantazio de la faranto. Ofte ankaŭ estas koko. Laŭ antikva tradicio la koko ja kriis, kiam Kristo naskiĝis. Pro tio la noktomeza meso havas ankaŭ la nomon „misa de gallo” (meso de koko). Por la plimulto el la familioj tio estas la komenco de la kristnasko. Post la noktomeza meso la familianoj kunvenas por manĝi specialan kristnaskan kukon kaj por tosti per cidro aŭ vino.

En la kamparo ankoraŭ ekzistas la kutimo, dum la dek du tagoj de kristnasko viziti la domojn por ĝojkanti. Oni akompanas la kantadon per flutoj kaj gitaroj. Kelkaj grupoj eĉ gajnas vesperman-

ĝon per la prezentado de unu el la antikvaj hispanaj misteraj teatraĵoj. La ĝojkantoj, laŭ la vortoj kaj la muziko, similas tiujn, kiuj ankoraŭ restis en la nordeŭropaj landoj de la 16-a kaj 17-a jarcentoj.

W. M. Goodes, Britujo.

ENIGMOJ.

Ĉi tiun fojon mi ricevis tridek sep (37) solvojn el Anglujo kaj unu el Francujo. En la estonto mi esperas ricevi pli el la aliaj landoj.

En Anglujo oni povas sendi solvojn ĝis la pezo de 2 uncoj por 1 d. (anstataŭ 2½), se oni lasas la koverton nefermita kaj skribas je la supro: „Edukaj Ekzercoj”. Oni bonvolu esplori, ĉu tio eblas ankaŭ en aliaj landoj. Tio ja ŝparas afrankokostojn!

I. Ĉiu indikilo estas besto. La komencliteroj formas feston.

1. Granda afrika besto.
2. Malgranda, utila besto.
3. Homido.
4. Malgranda besto, kiu vivas sur arboj.
5. Granda rabobesto.
6. Birdo, kiu bele kantas.
7. Malsaĝa besto.
8. Bongusta marfiŝo.
9. Nigra birdo.
10. Dekpieda marbesto.

II. Mi havas belan, nigran		Mia hundo svingas sian voston, Kiam mi proponas al ĝi oston.
Ĝi kaptis grandan, grizan raton.		

Verku du tiajn originalajn rimaĵojn.

Por enigmoj ni ne donas premiojn, sed vi ricevos poentojn. Post iom da tempo ni raportos pri tio en LJV. Vi do sendu viajn solvojn antaŭ la 20-a de januaro '50 al: s-ro T. K. Slade, 7 Southview Rd., Southampton, Anglujo. Klare aldonu viajn nomon, adreson kaj aĝon.

La solvo de la krucvortenigmo en la oktobra numero estas jena:

Horizontale: somer', rano, mond', al, bleki. — Vertikale: sama, -oro, II, man', se, en, dek, rompi.

Al ĉiuj legantoj ni deziras feliĉajn festotagojn kaj bonan Novjaron.

Grava malkovro!

Turisto trovis en kaverno, en itala arbaro, skeleton de urso. Ĉirkaŭ ĝia kolo estis fera ĉeno. La fino de tiu ĉeno estis fiksita al ŝtonego. Kaj sur tiu ŝtonego staris en la latina lingvo: „Tiun ĉi urson mi mortigis en la jaro LIV antaŭ Kristo. Caius Julius Caesar”.

La turisto unue tre ĝojis pri la trovo. Sed post iom da pripenso li piedbatis la skeleton kaj diris: „Trompaĵo!”

Kiel li sciis, ke ĉio estas falsa?

J. Kobza, Ĉeske Budejovice, Ĉeĥoslovakujo.

(La solvon ni donos en posta n-ro).

INTERNACIA JUNULAR-KUNVENO EN KONSTANZ.

La organiza komitato provizore fiksas la daton de la kunveno je 28-7—4-8-'49.

Oni planas tre belajn ekskursojn, i.a. al la Rejnakvofalego apud Schaffhausen.

Entute la kostoj ne superu 40 guldenojn.

En la januara n-ro ni donos pli detalajn informojn.

Sed oni jam nun anoncu sin ĉe: M. Schmidt, Grüngang 9, Konstanz a.B.



DENASKA ESPERANTISTARO-RUBRIKO.

Citaĵo el letero de s-ro Butler (Britujo) al la Gepatra Sekcio de Germana Esperanto-Centro: pri la Esperanto-eduko de miaj infanoj: Mi ĉiam senescepte parolis al ili nur en E-to. De la aĝo 11-12-monata ili ĉiam kaj senescepte kaj tute nature parolis al mi en E-to. Ili parolis ĝin frue kaj nature, kiel hejman lingvon. Tio estas afero tute ebla kaj natura, kondiĉe ke almenaŭ unu el la gepatroj parolas al la infaneto dekomence **nur en Esperanto**. La infano parolas al sia patro aŭ patrino ĝuste kiel la patro aŭ patrino parolas al ĝi Mi ne instruis E-ton al miaj infanoj, sed nur uzis ĝin tute simple kaj nature kiel ĉiutagan lingvon, kaj la infanoj tute simple kaj nature uzis Esperanton flue kaj bele kiel hejman kaj unuan lingvon. Jen ĉio!

**

Ĝepatroj-esperantistoj, jen bona ekzemplo! Ĉu vi ĉiuj jam aligis viajn infanojn al Denaska Esperantistaro? Ja estas tre grave, ne nur en la intereso de nia movado, sed precipe ankaŭ en la intereso de via infano mem: Ĝi estu „mondano”, ekde la naskiĝo.

Kaj ne sufiĉos, ke vi pagos la kotizon al D.E.: faru el viaj infanoj naturajn esperantistojn!

Bedaŭrinde ni devas konstati, ke multaj eĉ ne pagis la kotizon. Ni tial ripetas la kondiĉojn ĉi tie: Por infanoj ĝis 6 jaroj oni pagas 0,50 gud. (1 ŝ.) jare, ĝis 14 j.: 1.— guld. (2 ŝ.) (inkluzive de LJV 8-p), por pli aĝaj: 2,50 guld. (5 ŝ) inkluzive de LJV 16-p.).

Fine ni de ĉi tie ankoraŭ dankas ges-rojn Oliver en Rickmansworth (Brit.), kiuj donacis 400 gratulkartojn! Certe multaj, kiuj festis sian naskiĝtagon, jam ricevis tian novan karton, ĉu ne?

Kelkaj novaj anetoj: Verona Gertrud Walder, Eigenheim, Romanshorn, Svisujo (nask. 9-7-'49); Frederick Davies, 43, Grasmere Rd., Muswell Hill, London, Britujo (nask. 1-9-'36); Pierre Cayrou, Route Nationale 107, Prades (P.O.), Francujo (nask. 27-11-'45); Josseline Zerelli (nask. 10-9-'49) kaj Christiane Zerelli (nask. 22-3-'48), C.F.M., Louis-Gentil, Maroko.

POŝTMARKRUBRIKO.

En kelkaj lokoj oni ree aŭdas la postulon pri unuformaj poŝtmarkoj, kiuj validas en la tuta mondo, kaj kiujn oni povas aĉeti ĉe la poŝto de ĉiuj landoj. Oni jam esprimis tiun deziron post la unua mondmilito, kiam stariĝis la Popola Ligo. Nun oni postulas tion, ĉar oni supozas, ke estus al UN pli facile realigi tion ol al la eks Popola Ligo (en Genevo).

Sed ankaŭ tiu penso ne estis nova. Jam je la fino de la antaŭa jarcento aperis provpresoj de tia poŝtmarko. Kelkaj kolektantoj posedas ĝin, en tri diverskoloraj presaĵoj. Sur tiuj provpresoj staris dek reciproke samvaloraj vendprezoj de la poŝtmarko: 12½ Cent, 25 Peseta, 30 Cent, 8 Kop., 10 Kreuzer, 20 Pfennige, 2½ Pence, 5 Cent, 50 Reis kaj 24 Ore.

Oni ne scias, ĉu la tutmonda Poŝtunuiĝo en Bern (UPU, kiu ĵus festas la 75an datrevenon de sia fondiĝo per la germana ĝeneraloŝtredirektoro Heinrich v. Stephan) iam interesiĝis pri tiu projekto. Io tamen rezultis el tiu projekto: La internacia respondkupono. La prezo de tiu kupono ja estas iom pli alta ol la afranko al eksterlando. Tamen multaj uzas ĝin.

Internaciaj poŝtmarkoj? Bonega ideo! Sed kiu realigos ĝin??

o. timš.

Amiko Schmidt el Konstanz skribis al ni: „Kolektantoj estas feliĉaj homoj.”

Ho jes, s-ro Schmidt, tio estas vera. Sed ankaŭ la „libro-servistino” estas feliĉa homo, ĉar ŝi ricevas multajn poŝtmarkojn kaj ŝi forsendas multajn.

Ni devas danki J. Matulo en Ĉeĥoslovakujo, kaj Jos Kunert el Schwaben. Ni baldaŭ respondos. Ankaŭ de Günther Schaedel (Germ.) ni ricevis pm., de Stefan Hr. Koser (Bulg.), Vicente Rodrigo (Hisp.), J. Mielcarek (Pol.) kaj F. Appel (Ned.). Koran dankon!

Specialan dankon al Fritz Liehti (Svis). Ni jam forsendis viajn belegajn svisajn pm.

Ni bezonas pm. el Italujo, Svedujo, Nov-Zelando, el ĉiuj landoj de la mondo!

Libro-Servo T.J.O., Voorhaven 80, Edam, Ned.



SKOLTA RUBRIKO.

Kristnasko, tago de la paco.

(Legendoj pri la kristnaskarbo).

Abio vi, abio vi,

Kun foliar' fidela!

Vi verdas ne nur en somer',

Sed eĉ dum vintra frostveter',

Abio vi, abio vi,

Kun foliar' fidela.

Tiujn vortojn ni ĉiujare kantas, kiam ni sidas ĉirkaŭ la kristnaskarbo, sed malmultaj el ni konas la devenon de la kristnaskarbo. Mi do provos rakonti ion pri ĝi.

Unue mi devas konfesi, ke oni ne konas la ĝustan devenon. Ekzistas nur legendoj pri ĝi.

Laŭ germana legendo Luther elpensis la kristnaskarbon. Kiam li je kristnaskvespero vojaĝis hejmen, la vido de la steloj multe impresis lin. Kaj kiam li klopodis klarigi tion al sia edzino, li ekhavis ideon. Li kuris en la ĝardenon kaj dehakis malaltan abion. Post kiam li portis ĝin en la domon, li fiksas kandelojn sur la branĉojn kaj ekflamigis tiujn.

Alia legendo asertas, ke Sankta Vinfrid, misiisto en Norvegujo, elpensis la kristnaskarbon. Ĉar la loĝantoj adoris arbojn, li provis konvinki ilin, ke ili eraras. Tiucele li dehakis altan kverkon; kaj post kiam la kverko falis, oni ekvidis malaltan abion.

La sanktulo diris al la homoj: „Vidu tiun malaltan abion: ĝi ŝajnas infano en la arbaro. Hodiaŭvespere ĝi estos via arbo; ĉar ĝi estas ligno de la paco kaj viaj dometoj estas faritaj el tia ligno. Ĝia foliaro estas signo de senfina vivo, ĉar ĝiaj pingletoj estas ĉiam verdaj.”

En tiu punkto de Kristnasko ni ne forgesu niajn malfeliĉajn fratojn.

Multaj homoj suferas, ĉar estas malmultaj helpantoj. Ni, aĵoj de TJO, helpu al tiuj, kiuj suferas, ĉu esperantistoj aŭ ne. Ĉar la esperantista junularo estas por helpi la malfeliĉulojn. La homoj komprenos, ke la kono de nia lingvo naskas la amon al ĉiuj homoj. Tiel ni estos pabatalantoj kaj ni rajtas fieri pri nia paca agado kaj kanti nian himnon, verkitan de nia majstro, d-ro Zamenhof. Liajn paŝojn ni sekvu kaj per nia helpo al aliuloj ni fariĝu veraj Zamenhofanoj.

Johano Guillon, Francujo.

T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino A. Kaagman, Voorhaven 80, Edam Nederlando).



Ree aperis „Peranto inter la Perantoj”. La ĉefperantoj ricevis kvanton por siaj lokaj perantoj. Aliaj TJO-anoj povas peti ekzempleron de la sekretariejo kontraŭ unu respondkuponon.

Brazilo: La ĉefperanto informis, ke de la 15-a ĝis al 24-a de novembro en Bauru okazis filatela ekspozicio sub la patronado de la junular-organizo kaj plenaĝulaj Esp. grupo. Dum la ekspozicio oni uzis specialan memorigan stampilon, permesita de la Centra Departamento de Poŝto kaj Telegrafo. — La Urbleĝantaro de Bauru donis subvencion de 5.000 kruzejoj, laŭ leĝo No. 123.

Ni gratulas:

ges-rojn Stokvis—Fransen (Planetenplein 1, Haarlem, Ned.), al kiuj je la 23-a de oktobro naskiĝis filo: Hans;

ges-rojn Maertens—Schouteet (Prins Leopoldstr. 51, St. Kruis-Brugge, Belgujo), al kiuj je la 27-a de oktobro naskiĝis filo: Dirk;

ges-rojn Leegwater—Stiemer (Vooruitstr. 97, Purmerend, Nederlando), al kiuj je la 15-a de novembro naskiĝis filo: Rens.

Ges-rojn Aarse—Schreiber (Amsterdam, Pretoriusstr. 13², Ned. — Duisburg-Meiderich, Neumühlerstr. 134, Germ.), kiuj geedziĝis la 29-an de novembro;

F-inon M. Seilberger kaj s-ron J. Bout, kiuj gefianciĝis je la 4-a de decembro. (Siondwardsstraat. 16, Rotterdam, Ned.).

Propono.

La junulara sekcio de la Esperanto-grupo en Bremen intencas venontsomere aranĝi biciklo-vojaĝon tra Germanujo. Ĝi invitas eksterlandajn gemikojn partopreni, ĉar nur tiam la ekskurso estos interesa. Ree ekzistas vasta reto de belaj junulargastejoj, en kiuj oni povos tranokti. Ĉiuj gejunuloj, kiuj ŝatus partopreni senprokraste turnu sin al: Junulara Sekcio de la Esperanto-Grupo Bremen, p/a prez. Kurt Meyer, Parkstr. 99, (23) Bremen, Germanujo.

KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Anglujo: 21-jara junulino dez. kor. kun samaĝulino, kiu ĉeestos la Parizan kongreson. Joan Gamble, 3 Alliance Street, Stockton-on-Tees.

Bulgarujo: Mi dez. kor. k. geesperantistoj en l.t.m. Min interesas jubileaj pm., il. kartoj, sporto, ktp. Ljuben Uzunov, st. „Iskar” 2a, Burgas.

Wassil Reinow, 18-j., str. „Michal Koloni” 13, Sliven, dez. kor., interŝanĝi bildojn, esperantaĵojn, ktp., k.l.t.m. Respondo certa.

Ĉeĥoslovakujo: Josef Kobza, studento de teologio, Zizkova 14, Ceske Budejovice, dez. kor. kun ĉiuj landoj.

Du amikoj; Alois Šafránek, Reznovice 120, p. Ivančia kaj Jan Spesny, Zabrdovice 39, p. Olbramovica, dez. kor. k. interŝ. il. pk. k. ĉ. l. (pr. Svisujo, Italujo.

Esp. Junulargrupo, Reznovice 120, p. Alceovice, petas por sia letervespero il. poŝtkartojn. Ĉiu sendinto ricevos plaĉan surprizon.

Francujo: Dekduo da 15-17-j. liceanoj dez. kor. kun gesamaĝuloj en la tuta mondo. Aparta alvoko al gejunuloj en Hispanujo kaj Aŭstrujo. Skribu unue al: S-ro A. Frangeul, 42 rue du Pré-Pigeon, Angers (M. et L.)

S-ro Marcel Le Moal, 2 rue Fausses-Reposes, Versailles (S et O) dez. kor. kun geesperantistoj en la tuta mondo, pri ĉiuj temoj.

S-ino Angeard (28-j.) St. Saturnin par Brissac, (M et L), dez. interŝanĝi infanajn desegnojn kaj ilustritajn poŝtkartojn.

Germanujo: 15 gejunuloj dez. kor. kun junaj geesperantistoj en la tuta mondo. „Verda Stelo”, R. Obrock, Eschstr. 19, Bünde/Westf.

Mi bezonas ekspozician materialon, filatele afr. let. k. poŝtk., afiŝojn, prospektojn, ktp. Helmut Hübler, Horstheide 127, über Bielefeld 2.

S-ro Gerhard Genkel, Kiel, Moltkestr. 45, izolita esperantisto, dez. kor. k.ĉ.l. per let. Kolektas poŝtmarkojn. Respondo certa.

Hispanujo: Jesus Crusellas, Sejmboro 8, Zaragoza, dez. kor. kun gesamideanoj en la tuta mondo pri diversaj temoj.

Japanujo: 17-j. studento dez. kor., interŝ. il. pk., gazetojn, k.t.p. Kawazura Mituhiko, Higasi-hatusiba 272, Hikisyo-nure, Minamikowachigun, Oosaka-hu.

Nederlando: Grupo de geknaboj 13-15-j. dez. korespondi kun geknaboj samaĝaj, precipe en la skandinaviaj landoj, Germanujo, Svisujo, Aŭstrujo, Francujo, Belgujo kaj Anglujo. Respondo certa. Skribu al: Th. v. Kempen (p/a Kuypers), Wouwermanstr. 29 rd. Haarlem.

17 gelernantoj (9-j.) de kolenkurso dez. interŝ. il. poŝtk. k.ĉ.l. Skribu al: D. v. Dijk, Lanseloetstr. 14¹, Amsterdam-W.

Wim Prinsen, sportjurnalisto, Groningerstr. 328, Assen, deziras interŝanĝi bildkartojn kun ĉiuj landoj.

Novzelando: Gelernantoj 10-15-j. dez. kor. kun Sved., Franc., Ned., S. Ameriko. Skribu al s-ro Brendon Clark, Leigh, N. Auckland, N.Z.

Ĉu vi jam pagis vian kotizon por 1950?

Se ne, ni afable petas vin fari tion antaŭ 1 januaro.

PERANTOJ KAJ KOTIZOJ.

(La unua sumo rilatas la kotizon de la 8-p. organo (do por asp. TJO-anoj); la dua la kotizon por abonantoj, aktivaj- kaj subt. TJO-anoj).

Aŭstralio: Fr. Halls, Bogong, Via Wodonga, Vic.	§ 2.50	§ 6.—
Aŭstrujo: S-ro Alois Hilkersberger, Landeck, Tirol Lötzweg 1. Poŝtsparkonto 195356	§ 4.—	§ 9.—
Belgujo: S-ro Ph. Cullus, 36 rue du Radoux, Braine-le-Chateau; ĝironumero 806765	fr. 16.—	fr. 40.—
Brazilo: Luiz Bartolomeu, Caixa Postal N 201; Est. S. Paulo, Bauru	kruc. 7.—	kruc. 17.50
Britujo: F-ino N. Rees, Derwydd, Seven Sisters, Nr. Neath, S. Wales	ŝil. 2.—	ŝ. 5.—
Ĉeĥoslovakujo: Fr. Masek, post schr. 122 Most, Ĝironumero Ĉ. 2.331	kĉs. 19. —	kĉs. 47.—
Danujo: Kaj Pedersen, Chr. Hansensvej 4, Hol- baek	kr. 2.—	kr. 5.—
Finnlando: Eld. Vilho Setälä, Onentie 23, Hei- sinki-kä	fmk. 65.—	fmk. 160.—
Francujo: Roger Bizet, Wierre au Bois, par Samer, (P. d. C.), ĝironumero: Lille, 182135	fr. 100.—	fr. 250.—
Germanujo (Usona Zono): Günther Schaedel, München 22, Kaulbachstr. 61	M. 1.50	M. 3.50
Hispanujo: J. L. Ballesteros, Lista de Correos Madrid, S-ro M. Montserrat, Provenza 75, Bar- celona	pes. 4.—	pes. 11.—
Hungarujo: P. Balkanyi, MNB/FO, Budapest 54	frt. 4.50	frt. 11.—
Irlando: Seosamh O Conaire, O.S. Miss Plo- wer, Dunkellinstr., Loughrea, Co Galway ...	br. ŝ. 2.—	br. ŝ. 5.—
Italujo: Prof. Camuffó Armando, v. Bart, d'Al- viano 4, Trieste P.ĉ.k. 115277	L. 150—	L. 375.—
Maroko: Ben Sion Ohana, Rue de la Kashba 1, Marrakech; ĝironumero: „Rabat” c/c 368.92 ..	fr.fr. 100.—	fr.fr. 250.—
Nederlando: TJO-Centro, West-Graafdijk, ĝiro- numero: N. Kool, 382363	gld. 1.—	gld. 2,50
Polujo: Benedict Palczynski, Reda k. Gdynia ...	zl. 120.—	zl. 300.—
Portugalujo: A. P. da Silva, Quinta do Ferra, Rua b 28-2º D-to Lisbono	esc. 9.—	esc. 23.—
Svedujo: Esp. Förlagsföreningen, Fack 19071. Stockholm	Kr. 1.62	Kr. 4.—
Svisujo: S-ro Jos. Broglin, Obereyfeldweg 5, Pa- piermühle, ĉe Bern	fr. 1.62	fr. 4.—
Usono: E.A.N.A., 114 West 16th Str., New York II, N.Y.	dol. 0.40	dol. 1.—

Denaska Esperantistaro: Oni povas pagi la kotizon al la landaj ĉefperantoj de TJO. Britoj povas pagi al la brita sekretariino: S.ino G. P. Weston, 27 Cecil Rd., London N 10. Por anetoj ĝis 6 jaroj la kotizo sumiĝas la duonon de la kotizo por aspirantaj TJO-anoj.